Unu el la plej eminentaj pioniroj de Esperanto en Brazilo, Profesoro J.B.Mello e Souza, sendante al ni sian subskribon por la Deklaro kontraŭ la bojkotrezolucio, aldonis leteron, kies publikigon en la gazeto li permesis:

"Tre kara amiko: Mi deziras sciigi al vi kaj al niaj estimataj gesamĉdeanoj, kiuj direktas kaj redaktas Amerikan Esperantiston, ke mi varme protestas kontraŭ la alvoko dissendita de l'Komitato de UEA pere de la Centra Oficejo, laŭ la rezolucio aprobita en Marseille la 9-an de Aŭgusto.

"Mi tute malaprobas tiun nekredindan decidon, kiu reprezentas gravan ofendon al nia konscienco. Neniel kaj neniam mi permesos, ke iu ajn ordonu al mi: 'Ne legu tion!' aŭ 'Ne ekzameni la opiniojn de tiu sinjoro aŭ de tiu gazeto pri tiu afero!'

"Mi esperas, ke ĉiuj pensemaj Esperantistoj, kiuj scias, ke libereco estas nepre necesa por la progresado de ideoj, tuj malaprobos, kiel mi, ĉiajn perfortajn decidojn. Opiniojn kaj argumentojn oni devas, se necese estas, kontraŭbatali per aliaj argumentoj, neniam per truda devigo.

"Mi povas sciigi al vi, ke kelkaj brazilaj Esperantistoj, kleraj kaj sindonemaj kunbatalantoj por nia movado, pensas tute sammaniere kiel mi koncerne la malprudentan decidon."

El diversaj landoj Esperantistoj skribas al ni tute laŭ propra iniciato pri la afero. Ekzemple el Britujo, S-ro A. J. L. Hughes, tradukinto de la rakontoj de John Masefield, el kiuj unu aperas en la nuna numero de AE, skribas: "Mi tute konsentas kun la Deklaro... Se vi deziras aldoni noton al mia rakonto, vi povas fari tion, dirante, ke, kvankam la tradukinto sendis al vi la manuskripton antaŭ la 'malpermeso', li poste malkaŝe esprimis la deziron, ke ĝi estu publikigata, por montri, kion li, kiel membro de UEA, pensas pri la bojkoto."

Cetere ŝajnas, ke la bojkotrezolucio eĉ havigas al ni kelkajn novajn abonantojn. Samideano en Britujo, sendante al ni sian abonon, skribas: "Mi estas membro de UEA de sufiĉe multaj jaroj kaj volas fari mian propran opinion pri la artikoloj."

Ion tian cetere antaŭvidis eks-Vicprezidanto de UEA, kiu skribis al ni: "Mi tute nenion farus, se mi estus vi. Ĉar ofte jam montriĝis en la historio, ke ĉiu malbona faro punas sin mem, kaj ke cetere, se oni malpermesas ion al la homoj, ili fariĝas scivolaj kaj kontraŭas la malpermeson."

Por la Deklaro ni serĉis ne multajn, sed altkvalitajn subskribojn. Antaŭ la publikigo ni sendis la tekston al proksimume 50 personoj, al kelkaj el ili nur informcele. Ni ricevis preskaŭ 40 respondojn. Nur unu el la respondantoj, membro de la nuna Estraro de UEA, ŝajnis favori la bojkotrezolucion, sed eĉ li skribis: "Mi nur opiniis, ke oni *ne* postulu komercan bojkoton."

Kelkaj eminentuloj, kiujn ni invitis subskribi la Deklaron, deziris, ke iliaj nomoj ne estu enmiksita en disputon pri tia afero. Unu subskribis, sed poste kun bedaŭro retiris la subskribon por eviti eblan malutilon al grava entrepreno. Alia volis subskribi, "se tio estas nepre necesa", sed, pripensinte ĉiujn cirkonstancojn, ni respondis, ke lia subskribo ne estas nepre bezonata. Kelkaj eminentuloj diris, ke iliaj landaj

asocioj pritraktos la aferon kaj ke ili ne volas fari ion antaŭ tio en sia propra nomo.

Tamen preskaŭ ĉiuj, kiuj rifuzis subskribi, esprimis sian malaprobos de la bojkotrezolucio en pli fortaj vortoj ol la Deklaro. Eks-Vicprezidanto de UEA nomis la bojkotrezolucion "stultaĵo" kaj diris: "Se mi estus D-ro Solzbacher, ... mi fierus..., se mia artikolo ricevus tian reagon, ĉar ĝi montrus al mi, ke mi pravus. Se mi malpravus, oni ja kontraŭargumentus." Eks-Prezidanto de UEA nomis la bojkotrezolucion "nekonsilinda" kaj skribis pri Amerika Esperantisto, ke li "sincere trovas ĝin tre interesa". Eks-Prezidanto de unu el la plej gravaj landaj asocioj skribas, ke la bojkotrezolucio "transpasas la limojn de taŭga konduto". La Prezidanto de alia grava landa asocio, Komitatano de UEA, nomis la tutan aferon "stulta polemiko", kiun li ne deziras "pliakrigi". Prezidanto de ankoraŭ alia landa asocio, ankaŭ Komitatano de UEA, skribas, ke laŭ lia opinio estas eraro pensi, ke la "admono interrompi kontaktojn kun EANA kaj Amerika Esperantisto" estas reago kontraŭ la artikoloj de D-ro Solzbacher, ĉar "ili estas nur scienca kaj literatura kritiko aŭ pritrakto de kulturaj problemoj kaj kiel tiaj tute aprobindaj".

Letero de UEA-Komitatano, kiu mem partoprenis en la "unuanima" voĉdono en Marseille ŝajnas montri, ke almenaŭ kelkaj Komitatanoj ne bone komprenis, kion ili faris. Li skribas: "Bonvolu kompreni, ke ne temas pri 'bojkoto' en la senco, ke povas ekzisti 'bojkotrompantoj', kiujn oni 'punas'. Sed temas pri rekomendo, kiu tamen donas plenan liberon al ĉiu ano de UEA kaj al la aniĝintaj organizoj. Mi persone tre volonte legis viajn artikolojn kaj legos, se mi havos okazon plu ricevi Amerikan Esperantiston, ĉar mi estas dankema al tiuj samcelanoj, kiuj okupas sin pri niaj aktualaj Esperanto-aferoj internaj tiom multe, ke ili povas lerte kaj rajte kritiki."

Fama verkisto kaj Honora Membro de UEA ne volis subskribi la Deklaron, sed rimarkigis: "Ne pensu pro tio, ke mi aprobas bojkoton... Unu aferon permesu al mi diri: Viajn artikolojn en Amerika Esperantisto, kvankam mi ne ĉiam konsentas pri viaj kritikoj, mi tamen ĉiam legas kun intereso kaj profito. Per sola aplaŭdado oni ne servas al la progreso."

URBO DE LA "BOLETÍN" SUFERIS KATASTROFON

Valencio sub diluvo kaj inundo estas informoj senditaj al ni de Luis Hernandez, la redaktoro de *Boletín* (oficiala organo de la *Hispana Esperanto-Federacio*, kies sidejo estas en tiu mediteranea urbo). La terura katastrofo okazis la 14an de oktobro, disportante detruon, pereon kaj morton. La kutime trankvila rivero Turia elbordiĝis kaj lavange inundis la urbon. Tiel forta estis la impeto de la alfluo, ke en furioza ondo la rivero penetris, englutinte ĉion, eĉ en la urbocentron. Oni diras, ke pli ol tricent domoj estis plene detruitaj, kaj neniu hejmo restis sen difektiĝo. La nombro de viktimoj alproksimiĝis al la dua milo. Estis la plej granda kataklismo en la tuta historio de la urbo Valencio. Sed bonŝance neniu Esperantisto perdis la vivon nek suferis gravan perdon de sia havaĵo, laŭ lastatempaj informoj de la "Boletín". Ni simpatias kun la suferantoj en la afliktita urbo Valencio.

The Esperanto Association of North America

Konkurso pri Novaj Membroj: Post la listo publikigita en Maja-Junia n-ro de AE, la sekvantaj personoj varbis novajn membrojn por EANA: D. Jagerman (1), J. Gamble (1), D-ro A. Alemán (1), Rev. R. Sparks (1), H. Kruse (6), A. Smith (1), F. Neumann (1), H. Tobusch (1), I. Hordiuk (1), D-ro W. Solzbacher (16), D. Walton (4), J. Percy (1), Max Bear (12), F. Hoekstra (7), D. Alfske (5), H. Walton (3), C. Davis (2), H. Kaczowski (2), C. Prewitt (1), E. Yunghans (3), N. Soman (1), G. Hirsch (1), P. Mimplitsch (2). Jen "la unuaj kvin", kiuj varbis plej multe da novaj membroj dum 1957: D-ro Wm. Solzbacher (17), Max Bear (12), Faith Hoekstra (10), Henry Kruse (9), Donald Walton (8).

"Amerika Esperantisto" en Bibliotekoj: Membroj de EANA konstante abonigas Publikajn aŭ Instituciajn Bibliotekojn al nia gazeto. Lastatempe la jenaj personoj sendis kontribuojn por tiu celo: D. Walton (1), A. Alfaroli (3), Wm. Vathis (5), V. Whanger (5), D. Munro (1), E. Knudsen (1), Rev. A. Sandro (1). Koran dankon al ĉiuj. Renovigante vian membrecon en EANA, aldonu abonon por via loka Publika Biblioteko, aŭ iu alia grava publika institucio en Usono. Tiuj donac-abonoj kostas nur \$1.00 jare.

Nova Dumviva Membro de EANA estas Ralph L. Williams, Jr., el Baltimore, Md., kaj New York. "Bill", kiel li nomiĝas, partoprenas kunvenojn de la loka Nov-Jorka klubo kaj jam ĉeestis tri kongresojn de EANA. Ni kore bonvenigas lin kaj sincere dankas pro lia subteno.

Kontribuoj al la Subtena Kaso: D-ro Wm. J. H. Knappe \$1, Olivier de Guise \$3, Dona Jo McQuade \$2, Y. Gulsoy \$2, William P. Vathis \$1.50, "Dankema leganto de AE el Eŭropo" \$5, Rev. R. Sparks \$2, C. D. Prewitt \$5, Stanley Otto \$5, Grace Randolph \$12, J. P. A. Greenwood \$5.05, Max Bear \$9.50, D. Scott, S. Korzla. Koran dankon al ĉiu.

The Honor Roll of EANA (Sustaining Board Members, Patrons, Donors of ten or more Library Subscriptions, etc.) will be printed in the next issue of AE. There is still time for your name to appear in the list, if you send your renewal as Patron, Member of Sus Bd, or Donor. You can help tremendously by raising your category of membership this year.

The Sustaining Board of EANA is of extreme importance to the financing of your Association, since it is the self-help basis for continuing to receive extra funds from outside sources. Are YOU on the Board? If not, won't you add your name for this important year 1958, with a donation of \$3 per month? (\$2 for student; \$5 or \$10 for those who can.)

Increase in EANA Membership: We are happy to report largest membership at year-end, Dec. 31, 1957, since beginning such counts 5 years ago.

Esperanto Film "Introducing New Zealand": May be obtained by sending a fee of \$1.00, with request for booking to: *New Zealand Embassy, 19 Observatory Circle, Washington 8, D. C.*

ESPERANTA KRONIKO

La gazeto PMLA (Publications of the Modern Language Association of America) menciis en sia numero de Decembro 1957 la verkon de *D-rino Ivy Kellerman Reed*, kiu komparas Esperanton kaj la Interlingua-projekton de IALA.

Pri la artikolo de S-ro Montagu C. Butler, Akademiano, "Angla Opinio pri Amerika Esperantisto", venis rimarkoj el diversaj partoj de la mondo. El Svedujo *S-ro Paul Nylén*, Akademiano, Esperantisto de pli ol 65 jaroj kaj unu el la plej eminentaj kaj meritplenaj pioniroj de nia movado, skribis la 16-an de Decembro 1957: "Tiu gazeto (Amerika Esperantisto) estas ja inter la plej bone redaktataj en Esperantujo kun ege valoraj artikoloj, kaj mi plene samopinias kun mia malnova amiko Butler (p. 148, nov-dec. 1957)." El Svedujo ankaŭ *S-ro Karl-Olof Sandgren*, renovigante la abonon al AE por si kaj sia edzino (Anna Alamo-Sandgren), skribis la 20-an de Decembro: "Mi legadas vian gazeton kun ne malpli da intereso, kaj amiko Butler esprimis sur p. 148 opinionon, kiu proksimume estas ankaŭ la mia." El Aŭstralio *S-ro F. R. Banham*, Redaktoro de La Rondo, skribis la 16-an de Novembro: "En la Novembra-Decembra numero de La Rondo mi publikigis ion antaŭ ol vidi rimarkojn de Butler. Notu la similecon de lia kaj mia opinioj pri Amerika Esperantisto: ... 'La gazeto de EANA estas bibliografie tre valora. Mi ne konas similan, kiu rajtus kompariĝi kun ĝi. Neniu serioza studanto de nia movado, en ĝiaj historiaj kaj ankaŭ ĝiaj aktualecaj aspektoj, volonte senigus sin je tiu revuo...'"

Du novaj projektoj por internacia lingvo aperis lastatempe. Unu estas nomita "**suma**", kaj estas inventaĵo de kuracisto *D-ro Barnett Russell* en Kalifornio. Ĝi estas tute apriora, sen iu ajn rilato al vivantaj lingvo-elementoj. Ĉiu vorto ŝajnas esti el la imago de *D-ro Russell*. Li nomas ĝin "la mil-vorta universala lingvo". Ĝi havas 19 literojn, ĉiam skribatajn per minuskloj. Eble kelkaj vortoj montros la sistemon: saluton-*moli*, bonan matenon-*moli*, bonan tagon-*meli*, bonan nokton-*meli*, fronta pordo-*pago tago*, malfronta pordo-*pigo tago*, flanka pordo-*kiso tago*, glaso da biero-*gime bira*. La dua projekto estas nomita "**loglan**", kaj estas la inventaĵo de profesoro *D-ro James C. Brown* en Florido. Li planas vortaron de kvin mil ĝis dek mil vortoj. La centra ideo de "**loglan**" (t.e. "logika lingvo") estas por miksi vorterojn el ordinaraĵoj de la lingvoj angla, ĉina, rusa, japana, hispana, germana, hinda, kaj franca, por ke ĉiu persono trovu peceton de sia propra vorto en la vorto-miksaĵo de "**loglan**". Ekzemple la vorto por homoj estas *menmi*, kiu devenis de la angla "*men*" (homoj), la lastaj du literoj de la ĉina "*ren*" (homoj), lastaj du literoj de la hinda "*admi*" (homoj), kaj la tri komencaj literoj de la germana "*Menschen*" (homoj). Laŭ *D-ro Brown*, ĉiu persono tiamaniere rekonos la "**loglan**"-vortojn. La profesoro ankaŭ inventis diversajn enigmo-ludojn. Kaj tiu lasta fakto ĵetas lumon sur lian "internacian lingvon", kiu estas vere nur speco de ludado per vorteroj (t.e. enigmo-miksaĵo de pecetoj de vortoj el la plej variaj fontoj). Sed notu, ke la tuta historio de *vere vivantaj* internaciaj lingvoj estas: Volapük, Esperanto (post la morto de Volapük), Esperanto kaj Ido, kaj nuntempe nur Esperanto (post la morto de Ido). Ĉiuj aliaj estas nur projektoj, aŭ pli precize – ludiloj.

Pastro Robert Sparks, West Avon Church, Avon, Conn., informas nin, ke li kaj la edzino ĉeestos la Universalan Kongreson en Mainz, Germanujo, en 1958. Ili ankaŭ vizitos amikojn en Anglujo kaj sur la kontinento, kiujn ili konis dum jaro de instruado en Manchester, Anglujo, kaj dum vojaĝo tra Eŭropo, en la jaro 1956. Pastro Sparks ĉiam tre afable helpas al la Asocio, kaj servis per preĝoj ĉe la malfermo de tri kongresoj de EANA: New York 1953, New York 1954, kaj Newark 1957.

Salutoj el Koreo venis de kelkaj Esperantistoj tie. Nia membro *Soldato Enrique Fong*, deĵoras en la usona armeo en Koreo. Li skribis al ni pri vizito al Japanlando en novembro 1957. Pro Esperanto kaj pro la bel-eco de Japanlando, li tre multe ĝuis la viziton en tiu lando.

La gazeton "Amerika Esperantisto" oni ŝatas inter kleraj Esperantistoj en Eŭropo. Unu ekzemplo el multaj estas *S-ro Menu* en Francujo, kiam li sendis abonon: "Specimeno de via gazeto 'Amerika Esperantisto' atingis min. Traleginte ĝin, mi povis konstati, ke ĝi havas belan aspekton kaj interesas min pro la artikoloj kiujn ĝi enhavas. Por mi plezuro estas duobla, kiam mi legas ĝin, ĉar mi ankaŭ konas la anglan lingvon."

"Bazaj 500 Esperantaj Vortoj" verŝajne estis pritraktitaj ie en la literaturo de Esperanto. Membro nia demandas pri tiu afero. Ni opiniis, ke estis en la libro *"Verda Koro"* (Baghy), sed oni parolas pri bazaj 1000 vortoj en tiu verko. Ĉu iu leganto de "AE" scias pri listo aŭ pritrakto de "bazaj 500 vortoj" por simple verki en Esperanto?

S-ro John P. A. Greenwood, patrona membro de EANA en Kalifornio, paroladis antaŭ sia 'Tagmanĝo-Klubo' en oktobro pri Esperanto. Li raportas pri bona sukceso tiurilate. Kiel propagandiloj por disdoni, li utiligis la foliojn "Tune in on the World" kaj "Esperanto at a Glance".

Michael Goldenberg estas nova membro de EANA en kolegio en Nov-Jorko, sed li jam studas Esperanton diligente, disdonas propagandilojn al siaj kunstudantoj, kaj eĉ faris paroladon pri Esperanto en kurso nomita Lingvistiko I. La parolado bone sukcesis, pro la kapablo de Michael kaj (eble!) pro tio, ke ĝi okazis en la "bonŝanca tago" vendrede la 13an de decembro. Li ricevos diplomon de bakalaŭro de lingvoj kaj literaturo en januaro 1958. Gratulon al li.

Lima Esperanto-Asocio, Lima, Ohio, estas unu el niaj lokaj grupoj kiuj aliĝas al EANA centprocente. Dum multaj jaroj ni jam fieras pri tiu bonega grupo, sub la prezidanteco de *D-rino Luella K. Beecher*. Ŝi estas eminentulino ne nur en la Esperanto-Movado, sed ankaŭ en la Bahaista Kredo. La asocio en Lima konsistas el Bahaistoj, kiuj samtempe estas Esperantistoj. Antaŭ multaj jaroj, tiu grupo gastigis belan kongreson de EANA en Lima. Letero de la sekretariino, *S-ino Arthur M. Vaughn*, kun kotizoj kaj bondeziroj por la Nova Jaro, informis nin, ke *D-rino Beecher* iris al Grenada, B. W. I., por resti dum la vintro. Ni bedaŭras aŭdi pri la malsano de *S-ro Earl Sealts*, kaj deziras al li bonan resaniĝon. La oficistoj elektitaj por la nova jaro estas: *D-rino Luella K. Beecher*, Prezidanto; *S-ino Harry Jay*, Vic-Prezidanto; *F-ino Mae Ayers*, Dua Vic-Prezidanto; kaj *S-ino Arthur M. Vaughn*, Sekretario-Kasisto. Bondezirojn al ĉiuj en la Lima Esperanto-Asocio por la Nova Jaro.

S-ro Adriano Ragracias, Samar, Filipinaj Insuloj, leganto de *Amerika Esperantisto* dum multaj jaroj, skribas pri propagandaj klopodoj, kiujn li faras tie. Li nun estas Provinca Inspektoro pri Saneco en Samar. Li ankaŭ studas juron. En la jaro 1947, *AE* (en la maja-aŭgusta numero) presis leteron de li al la ĵus restarigita Esperanto-movado en Japanujo – tuj post la milito. Kvankam S-ro Ragracias estis aktiva filipina gerilo, kiu batalis kontraŭ la Japanoj, li estis inter la unuaj por etendi la manon de paco al la ĵus venkitaj “malamikoj”.

Esperantaj ideoj por plibonigi niajn propagandon kaj laboron venas de *Olive Morris*, Detroit, kiu ĉeestis la 47-an Kongreson de EANA. Unu sugesto estas, ke oni kuragiĝu komencantojn porti insignon kun la litero “K” aŭ “L”, signifanta komencanton aŭ lernanton. Tiamaniere la spertaj Esperantistoj povus paroli pli malrapide kaj klare al niaj novaj Esperantistoj. Alia sugesto estas, ke ni instigu al bibliotekistoj enmeti Esperantajn librojn en bibliotekoj per peto por libroj kiel *Esperanto*, *The World Interlanguage*, ktp. Impresis al S-ino Morris ideoj tiaj, kiam ŝi legis la gazeton de nia frata brita asocio. Ni esperas, ke niaj membroj sekvos la bonan konsilon.

George Hirsch, ranĉisto en la plej sud-okcidenta angulo de Nord-Dakoto, konteo Bowman, morale kaj finance subtenas nian Asocion ekde fruaj jaroj. Li estas Patrono kaj kontribuanto al la subtena kaso. Li ankaŭ propagandas Esperanton konstante en sia regiono. Li vizitis malnovan Esperantiston en la sama konteo, *Howard L. Corwin*, kaj entuziasmigis lin realigi al EANA. Interese estas, ke nia denova membro, dum studado en altlernejo en 1930, instruis Esperanton al pli ol 40 studentoj en studrondo post la lernejoj horoj. Li ankaŭ estas ranĉisto, kiel S-ro Hirsch, al kiu ni kreditas la membriĝon. Korajn salutojn al ili ambaŭ.

En la Universitato de Saskatchewan (Kanado), la studentoj lernas pri Esperanto pro la propagandaj klopodoj de S-ro *Peter Tan*, kiu studas tie. Li metas afiŝojn kaj flugfoliojn sur la bulten-tabulon. Li raportas interon pri Esperanto inter la studentoj, kaj trovis unu studenton el Norvegujo, kiu lernis iom da Esperanto en sia hejmlando. Peter antaŭe studis en Luther-Kolegio, Iowa, kie li multe propagandis por Esperanto. EANA nun havas novajn membrojn el tiu kolegio, pro la bona publikigado lia. Peter planas studadon en la Universitato de Minnesota en la somero.

Praktika Esperantistigado estas helpata en Kebeko pro interesa regulo por la lernantoj en la kursoj de S-ino *Thérèse Héroux*. Ĉiu lernanto devas konsenti por lernigi aliajn personojn post iom da lernado mem. Kiel malmultekostan propagandilon kaj lernilon por tiu celo, la novebakitaj Esperantistoj utiligas la unikan multilustritan libron *“Practical Esperanto”* de D-ro Wm. Benson. S-ino Héroux klarigis jene: “Por min stimuli, mi decidis krei klubon, kondiĉe ke miaj lernantoj, post unu aŭ du monatoj, lernigu mem al kelkaj personoj; tio komprenigas la konstantan mendon pri la lernolibro Benson”. La klubo kompreneble ankaŭ utiligas la libron *“Esperanto: The World Interlanguage”*; sed por simpla teksto *“Practical Esperanto”* bone sukcesas. Ĝi havas 160 pagojn kun pli ol 600 klarigaj bildoj, kaj kostas nur 25¢ ĉe EANA. La sukcesa Esperantistigado de S-ino Héroux meritas provon ĉie.

ĈARLATANA LINGVOSCIENCO

Marr – Drezen – Stalin – Ĉikobava – Lapenna

D-ro William Solzbacher

Membro de la Akademio de Esperanto

(Daŭrigo de artikolo en AE de Marto-Aprilo 1957 kaj sekvintaj numeroj)

“Marr estis tute preta distordi kaj eĉ falsigi lingvajn faktojn”, diras Profesoro Lawrence L. Thomas de la Universitato de Kalifornio en artikolo, kiun mi jam menciis (*Some Notes on the Marr School*, p. 326). Li poste klarigas, ke la Marr-doktrino permesas al iu ajn sonŝanĝo okazi aŭ ne okazi, kaj al iu ajn sono korespondi al iu alia sono en alia lingvo. Tiel kompreneble oni povas “pruvi” ĉion.

Unu el tiuj etimologiaj ĉarlatanaj estas uzata de Marr – kaj ankaŭ de Lapenna – por subteni la teorion, ke la lingvo unue estis “mana” lingvo kaj ke la “sona” lingvo evoluis nur tre malrapide el la “prasonoj” *sal, ber, jon kaj roŝ*. En piednoto sur paĝo 24 de *Retoriko* D-ro Lapenna skribas: “En la rusa lingvo ‘mano’ signifas *ruka*; ĝi transformiĝas tra la verbo *ruŝitj (rubnutj)*, tra *rub* en *dub* kaj *duŝa*, kio signifas ‘animo’. Pli detale en la *Jafetida Teorio* de Marr, p. 93. La saman transformiĝon oni trovas en la kroata kaj en la serba lingvoj.” La rusa ekzemplo venas de Marr, la serbokroatan ekzemplon Lapenna prenas el sia propra butikoj.

Tia etimologia argumento povas kaŭzi nur ridon inter lingvistoj. *Ruka* kaj *duŝa* (en la rusa lingvo tiuj vortoj havas la akcenton sur la lasta silabo, en la serbokroata sur la unua) neniel estas parencaj. Eĉ la vokalo *u*, kiu ŝajnas esti komuna al la du vortoj, havas malsaman devenon. Lapenna devis nur observi la najbarojn de la serbokroatoj por vidi tion. En la slovena lingvo la vortoj estas *roka* kaj *duŝa*, en la makedona *raka* kaj *duŝa*, en la bulgara *reka* kaj *duŝa*. En la malnovslava lingvo la vortoj estas *rōka* kaj *douŝa*, en la pola *reka* kaj *dusza*.

“La Mano kaj la Lingvo”

Kiel mi jam menciis, la marksista kaj materialista literaturo enhavas multajn asertojn pri la rolo de la mano en la estiĝo de la lingvo. Ĉiuj tiaj ideoj reiras al artikolo de Friedrich Engels, *La Laboro en la Transiro de la Simio al la Homo*, verkita en 1876 kaj publikigita en 1896 en la revuo *Neue Zeit*. En la anglalingva eldono (*Karl Marx and Frederick Engels, Selected Works in Two Volumes*, Moscow, 1951) ĝi aperas sur pp. 74-85 de la Dua Volumo sub la titolo *The Part Played by Labour in the Transition from Ape to Man*.

Engels klarigas, ke “tre alte evoluinta raso da antropoidaj simioj”, kun barboj kaj pintaj oreloj, iam vivis en tropika regiono, grimpante en la arboj, “verŝajne en granda kontinento, kiu poste malaperis en la Hinda Oceano”. Tiuj simioj iom post iom, kiam ili moviĝis sur la tero, komencis iri sur du piedoj kaj uzi la manojn por aliaj celoj, ekzemple por teni bastonojn, per kiuj ili defendis sin kontraŭ malamikoj. La homa mano evoluis tiel, ke fine ĝi ebligis la kreadon de “la pentraĵoj de Raffaello, la statuoj de Thorwaldsen, la muziko de Paganini”. La mano ebligis la laboron, kaj la laboro kreis inter la homoj la bezonon diri ion unu al la aliaj. Tiu bezono kreis la lingvon.

La ideo pri “la mano kaj la lingvo” kiel la du plej gravaj posedaĵoj

de la homo eniris diversajn sciencajn verkojn eĉ ekster la marksista partia literaturo. "La mano kaj la lingvo: En tiuj du konsistas la hom-eco", diris Henri Berr en siaj antaŭparoloj al *Le Langage* (La Lingvo) de J. Vendryès kaj ankaŭ al *Prehistoric Man* (La Antaŭhistoria Homo) de Jacques de Morgan, antaŭ pli ol tridek jaroj. Tamen la scienco jam de longe forlasis tiun troigitan ideon pri la graveco de la mano. Fakuloj pri antropologio trovis, ke la mano estas nur unu el multaj anatomiaj detaloj, kiuj estas gravaj por diferencigi la homon de la bestoj. D-ro Carleton S. Coon, kiu estras la Etnologian Muzeon de la Universitato de Pensilvanio, parolas en *The Story of Man* (New York, 1954) pri "kvin donoj de la naturo", kiuj karakterizas la homon kaj kiuj estas: 1. rekta irado, 2. libere moviĝantaj brakoj kaj manoj, 3. akre-vidantaj okuloj, 4. cerbo kapabla klare percepti kaj fari delikatajn juĝojn kaj decidojn, 5. la kapableco paroli. Mi ne deziras ekzameni nun, ĉu tiu klarigo estas tute kontentiga, sed almenaŭ ĝi estas multe pli ĝusta ol la ideoj pri "la mano kaj la lingvo".

Cerbo kaj Mano, Homo kaj Simio

Cetere, por reveni al la ekzemploj de Engels, oni devas diri, ke la genio de Raffaello, Thorwaldsen kaj Paganini ne troviĝis en la anatomio de iliaj manoj, kiuj ne diferencis multe de aliaj homaj manoj, sed en la cerbo kaj spirito. Eĉ se homo havus la manon de ĉimpanzo aŭ kiam homo perdas manon kaj devas uzi artefaritan manon aŭ alian korpoparton, li povas fari milojn da laboroj, kiujn neniu besto povus fari.

Eĉ la opinio, ke la homa mano estas pli "perfekta" ol la mano de orangutango aŭ gorilo, estas duba. Ŝajnas, ke la homa mano pli similas la manon de simio el la "pli malaltaj" specoj ol la manon de iu el la "pli alte evoluintaj" antropoidaj simioj. En la Unua Volumo de la fama kvinvoluma *Historio de la Tekniko* de Singer-Holmyard-Hall (London, 1954), Kenneth P. Oakley (Sciencisto de la *British Museum*) diras, ke "la kvinvingra mano de la homo estas tiel ĝenerala, ke oni devus serĉi inter la unuaj mambestoj aŭ eĉ inter la reptilioj, de kiuj ili devenis, por trovi tiel primitivan simplecon. Laŭ la muskola konstruo la homa mano estas fakte pli simila al tiu de malpli alta simio el la Malnova Mondo ol al tiu de iu el la grandaj antropoidaj simioj." Kaj li citas verkon de F. Wood Jones, kiu skribis: "Ni serĉos vane por trovi movojn, kiujn homo povas fari kaj simio ne povas fari, sed ni trovos multe, serĉante celhavajn movojn, kiujn homo faras kaj kiujn simio neniam faras." (*A History of Technology*, Vol. I, p. 12.)

Eble ni nun sufiĉe pritraktis la ideojn de Marr, ĝiajn fontojn kaj ĝiajn efikojn en la Esperanto-movado, de Drezen ĝis Lapenna. Ni nun donu ion da atento al la sinteno de Stalin kaj liaj posteuloj al lingvaj problemoj kaj al Esperanto.

Kiam Stalin Lernis Esperanton

Ke Stalin iam lernis Esperanton, estas fakto sufiĉe bone konata. Ŝajnas tamen, ke ĝis nun *Amerika Esperantisto* estas la sola Esperanto-gazeto, kiu publikigis pri tiu fakto la detalojn, kiujn Leon Trocki donas en sia Stalin-biografio (AE, Jan.-Febr. 1957, pp. 9-10). Ĉar la antaŭa artikolo estis en angla lingvo, eble estas utile, ripeti la citaĵojn nun en Esperanto, kun kelkaj aldonaj detaloj.

Kie kaj kiam Stalin lernis Esperanton? En la Bailov-Malliberejo en

Baku en 1910. Pri tio atestas Semen Vereŝĉak, membro de la Social-Revolucia Partio (*ES-ER*), kiu estis malliberulo en la sama karcero kiel Stalin. Stalin, kiu uzis multajn pseŭdonimojn dum sia vivo, tiam estis konata kiel Koba laŭ la nomo de heroo en grua legendo. La rememorojn de Vereŝĉak, kiuj aperis en rusaj gazetoj ekster Rusujo, uzis Trocki en sia Stalin-biografio sur pp. 118-119 (Leon Trotzky, *Stalin — An Appraisal of the Man and His Influence*, New York kaj London, 1941).

“Koba sane dormis aŭ trankvile studis Esperanton; li estis konvinkita, ke Esperanto estas la internacia lingvo de la estonteco.” Tiu dormado kaj Esperanto-studado estis rimarkinda, ĉar la cirkonstancoj estis eksterordinaraj: “La mortkondamnitaj manĝis kaj dormis kun la aliaj. Antaŭ la okuloj de la malliberuloj oni elkondukis ilin dum la nokto kaj pendigis ilin en la korto de la malliberejo, tiel ke la krioj kaj ĝemoj de la pendigitaj estis aŭdeblaj en la karcero.” Trocki diras pri tio: “Estus idiote pensi, ke Koba estis indiferenta pri la ekzekutoj. Sed li havis fortajn nervojn kaj ne sentis pri aliaj, kiel li sentis pri si mem. Tiaj nervoj estis valora posedaĵo...”

Ĉu Stalin komencis studi Esperanton en la malliberejo aŭ ĉu li daŭrigis studadon komencitan antaŭe, estas detalo, pri kiu Vereŝĉak nenion diras. Ĉu, kiam kaj kiom Stalin praktike uzis la lingvon, estas alia detalo, pri kiu mankas faktoj. Laŭ Trocki, kies informoj tamen eble ne estis sufiĉe kompletaj por pravigi liajn konkludojn, Stalin neniam lernis sufiĉe da Esperanto por povi uzi la lingvon praktike. Trocki komparas tion kun la sensukcesaj provoj de Stalin, lerni la germanan lingvon. Li skribas: “En la malliberejoj de Batum kaj Kutaisi... Koba klopodis esplori la misterojn de la germana lingvo. En tiu tempo la influo de la Germana Social-Demokrata Partio sur la Rusan estis treege granda. Sed Koba sukcesis eĉ malpli lerni la lingvon de Marx ol lerni lian doktrinon. En la malliberejo en Baku li komencis studi Esperanton kiel ‘la lingvon de la estonteco’. Tiu detalo plej malkaŝe montras la kvaliton de la intelekta tendenco de Koba, kiu en lernado ĉiam serĉis la linion de la plej malgranda rezisto. Kvankam li pasigis ok jarojn en malliberejoj kaj en ekzilo, li neniam sukcesis lerni eĉ unu fremdan lingvon, eĉ ne kun la escepto de lia malbonŝanca Esperanto.”

Lenin kaj Esperanto

Pri Lenin oni povas diri, ke li neniam serioze okupiĝis pri Esperanto, sed ke li kelkfoje faris favorajn, kelkfoje malfavorajn rimarkojn pri la lingvo. Esperanto nenie estas menciata en liaj verkoj aŭ publikigitaj leteroj. La malfavorajn rimarkojn raportis ĉefe liaj vidvino kaj fratino. Teorie Lenin instruis, ke nacioj kaj naciaj lingvoj malaperos en la komunista socio de la estonteco, sed li indikis, ke tio okazos nur post longa, longega tempo kaj ke ĝis tiam la disvastigo de la rusa lingvo estas io, kio lin multe interesas.

(daŭrigota)

KOREKTO

Ĉarlatana Lingvoscienco en la numero de Novembro-December 1957 (p. 152, 4-a alineo) enhavis mension de la rusa Imperiestro Aleksandro II-a. Arakĉeev vivis sub *Aleksandro I-a*.

LA DIABLO KAJ LA MALJUNULO

John Masefield

(Poeto-Laŭreato de Granda Britujo)

Kun la permeso de la aŭtoro tradukis A. J. L. Hughes

La maljuna kapitano donis tri taskojn
al la Diablo kaj gajnis la ludon.

(Klarigo de kelkaj maristaj terminoj aperas je la fino.)

MALPROKSIME, en norda Britujo, iam vivis ulo, kiu neniam prosperis. Ĉio, al kio li sin donis, malsukcesis, kaj kiel lia kondiĉo malboniĝis, tiel liaj amikoj malmultiĝis ĝis finfine li malesperis. Tial, iun vesperon, li sidis sola en sia ĉambro, pripensante la lupagon, pagendan post du aŭ tri tagoj, kaj la monon, kiun li nepre ne povos amasigi. Subite li ekkriis, "Ho, se mi povus forvendi la animon al la Diablo, kiel rakontas la malnovaj libroj!"

Li apenaŭ finis tiun paroladon, kiam la horloĝo sonorigis la dek-duan horon, kaj dum la sonorado fajrero ekbrilis en la ĉambro, la aero subite ekodoris de sulfuro, kaj Voĉo aŭdigis, dirante: "Ĉu ĉi tiuj kondiĉoj plaĉas al vi?"

Tiam li vidis, ke antaŭ li troviĝas pergameno. Li levis ĝin kaj legis; malesperante kaj apenaŭ sciante kion li faras, li respondis jese kaj serĉis plumon.

"Prenu la akton kaj subskribu," daŭrigis la Voĉo; "sed unue pripensu kion vi faras; nenion faru malprudente."

Do li pripensis iomete la aferon. "Jes," li diris, "mi subskribas!" Kaj tuj li palpsertis la plumon.

"Subskribu per sango el la maldekstra dikfingro," ordonis la Voĉo; tial li pikis sian maldekstran dikfingron kaj per sango subskribis.

"Jen via garantiaĵo," diris la Voĉo, "dudek naŭ pencoj el arĝento! Post dudek jaroj ni revidos nin!"

Frue en la mateno nia amiko rekonsciĝis, kaj li sin sentis kiel droninto. "Kia inkubo!" li diris al si mem. Tiam li vekiĝis, vidis la dudek naŭ pencojn kaj ekflaris etan odoron de sulfuro.

Do li sidadis en sia brakseĝo kaj rememoris, ke li forvendis sian animon al la Diablo por dudekjara plenumo de ĉiu deziro. Kiom ajn li ektimis pri tio, kio okazos post dudek jaroj, li sin konsolis per la penso, ke dudek jaroj estas ŝatinda periodo, dum kiu li povos manĝi, trinki, festadi, sin ruli en oro, sin vesti per silko, efektive esti senzorga, gaja kaj ĵibŝkotalventa(*)!

Do, dum dekaŭ jaroj kaj naŭ monatoj li vivis bonege, havante ĉion, kion li povis deziri. Sed, kiam lia jardudeko estis preskaŭ elĉerpita, ne troviĝis en la tuta mondo homo pli mizera, pli kompatinda ol li. Li forlasis sian domon, vendis sian havaĵon, siajn riĉaĵojn, ĉion, kaj forveturis al la havenurbo Liverpool. Tie li sin enskribis kiel maristo sur kargoŝipo, reklipero vojaĝanta al la Ĉina Maro.

La ŝipo moviĝis rapide, kaj kiam al nia amiko restis nur tri tagoj, ĝi troviĝis en la Hinda Oceano senmove kaj senvente.

Nu, je tiu posttagmezo estis lia deĵoro ĉe la direktilo, kaj pro tio, ke tute ne estis vento, li trovis sin sen okupo, krom la pensado pri siaj aferoj. La ŝipo kompreneble tute ne moviĝis. Tie li staris, ĝemante kaj plorante, ĝis kiam ĝuste dudek minutojn antaŭ la oka, supreniris la ŝipestro por ferdeka promenado. Li kompreneble malantaŭeniris, rigardis supren al la rigilaro, kaj tiam ekvidis nian amikon, kiu ploris apud la direktilo.

"Ho, amiko," li diris, "kio estas tio? Ĉu ia malsaneto? Vi devos veni en la kajuton je la kvara ĉi-nokte, por preni dozon da julepo."

"Ne, Sinjoro," respondis la mizerulo, "nenia julepo forigos mian malsanon."

"Kio do estas?" demandis la maljunulo(*); "vi ja malsanas, se estas tiel malbone. Sed via vango fariĝis tute kava. Kie estas la ĝeno? Ĉu io peze kuŝas sur via konscienco?"

"Kapitano," li respondis tre serioze, "mi forvendis mian animon al la Diablo."

"Ho," diris la maljunulo, "tio estas malbona afero. Jes, tio estas ege malbona. Mi neniam sciis, ke tiaj aferoj okazas, escepte en libroj."

"Kaj," diris nia amiko, "tio ne estas ĉio, Kapitano; je ĉi tiu sama horo, post tri tagoj, la Diablo venos por min preni kun si."

"Je la bona Sinjoro!" ĝemis la ŝipestro, "jen belega huranesto(*) sur mia ŝipo! Sed eble,"—li daŭrigis— "ĉu la Diablo ne proponis al vi ian protektan klaŭzon?"

"Jes, Kapitano," diris nia amiko. "Mi ĵus kompletigis la negocon, kiam atingis mian orelon flustrado. Kaj"—li tion diris mallaŭte, tiel ke la maato ne aŭdu—"se mi donos al la Diablo tri taskojn, kiujn li ne povos plenumi, mi estos savita, Kapitano, kaj mia akto estos nuligita!"

La maljunulo ridetaĉis. Li diris: "Lasu ĉion al mi, mia filo. Mi ordigos la aferon! Malantaŭen, unu el vi; anstataŭu lin ĉe la direktilo! Vi mem antaŭen rapidu, kaj estu trankvila, ĉar mi batalos por vi kun la Diablo. Ripozu kaj trankviliĝu!"

Tiel pasis la tago, kaj la morgaŭa, kaj la postmorgaŭa. Kaj la posta tago estis tiu, je kiu devis veni la Diablo.

Je la oka antaŭtagmeze la ŝipestro malantaŭenvokis la tutan ŝipanaron.

"Junuloj," li diris, "hodiaŭ mi havas taskon por ĉiuj. S-ro Maato," li ekkriis, "sendu ĉiujn knabojn al la ĉeftopvelhisiloj, kaj hisu la velon kiel eble plej rigide, vertikale."

Do, oni pasigis de mano al mano la ŝnurfinojn kaj deprenis la volvaĵojn de la hisiloj el la pinglegoj, kaj Jocjo la Markantisto fajfis: "La klipero sur la rivero..."

Kaj la jardo supreniris ĝis la butono de la masto, ĝis kiam la maŝaj splisoj fiksiĝis en la pulioj.

"Bone, miaj gajuloj," diris la ŝipestro; "nun levu mian boaton, kaj lasu ĝin treniĝi apud la ŝipflanko."

Kaj tiel oni faris.

"Bone," diris la ŝipestro; "nun antaŭen al la ĉenujo, kaj supren trenu la ĉenon ĝis la lasta ero kiun vi trovos."

Do la ŝipanoj hisis la ĉenkablon kaj etendis ĝin laŭ la ferdeko, kva-zaŭ preta por faligi la ankron.

"Nu, Ĉips (*)," diris la maljunulo al la ĉarpentisto, "ligu la ekstran ankron al la ĉeno kaj forprenu la antaŭkastelan gardrelon, por ke ĉio estu preta por faligi la ankron."

Tiel oni faris.

"Nun," diris la maljunulo, "alportu la kuvojn da graso el la kuirejo. Cedu tiun grason, Doktoro (*)! Bone, nu, vi ĉiuj klopodu, kaj ŝmiru ĉiun ĉeneron per graso, profunda je unu colo."

Tiel ankaŭ la maristoj faris, miregante pri la intencoj de la maljunulo.

"Bone!" kriis ĉi tiu. "Nun malsupren, ĉiuj! Ĉips, atendu sur la antaŭkastelo! Mi restos supre, S-ro Maato."

Do la ŝipanaro malsupreniris. Ĉips prenis plenpipon da tabako fordeventen de la kapstano, kaj la maljunulo tien reen ekpromenis, serĉante signon de infera fajro.

Daŭradis la senventeco. Post nelonge tamen, ĉirkaŭ la sesa sonorado, la maljunulo ekvidis nigran nubeton fordevente kaj en ĝi briletojn de fulmo; sed la ekbriloj estis tro ruĝaj kaj proksimiĝis tro rapide por esti naturaj.

"Nu," li diris al si mem, "pretiĝu."

Baldaŭ la nigra nubeto venis alvente tute apuden al la ŝiflanko; vidiĝis ruĝa ekbrilo, kaj ekestis forta sulfuraodoro; sekvis laŭtega ektondro, kaj la Diablo surŝipiĝis.

"Bonan tagon, Kapitano," li diris.

"Bonan tagon, S-ro Diablo," respondis la maljunulo, "kaj je la inferaj flamegoj, kion vi deziras sur mia ŝipo?"

"Nu, Kapitano," diris la Diablo, "mi venis por preni la animon de unu el viaj maristoj, laŭ akto subskribita; kaj ĉar mia tempo estas plene okupata en ĉi tiuj malpiaj tagoj, mi esperas, ke vi ne atendigos min pli longe ol necese."

"Nu, S-ro Diablo," respondis la maljunulo, "tiu, kiun vi atendas, dormas malsupre. Estus domaĝe, ĉu ne, voki lin antaŭ la ĝusta horo. Do, mi proponas al vi tri taskojn. Ĉu bone? Ĉu vi kontraŭas?"

"Ho ne," gorgridis la Diablo, "bonvolu daŭrigi."

"S-ro Diablo," diris la maljunulo, "ĉu vi vidas tiun ĉeftopveljardon? Lasu min vidi vin grimpi al tiu jardo, kaj refi la velon!"

"Certe, Sinjoro!" diris la Diablo, kaj li grimpis per la ŝnurŝtupoj en la topon, grimpis tra la topmastan rigilaron, kaj rampis eksteren laŭ la jardo.

Nun li trovis, ke la velo estas rigide vertikala, kaj li malsupren kriegis: "He, malsupre! Ferdekuloj! Malstreĉu la hisilojn!"

"Tute ne!" diris la maljunulo, "eĉ ne unu velfadenon!"

"Malstreĉu do la ŝkotojn!" ekkriis la Diablo, "la ĉeftopvelo estas tute rigida! Kiel mi povas refi, se la velo estas tia?"

"Nu," diris la maljunulo, "tion vi ne povas! Malsupren, hufpiedulo! Jen, unu poento al mi!"

"Jes," konsentis la Diablo, malsupren veninte, "mi tion ne neas, Kapitano; unu poento al vi."

"Nu, S-ro Diablo," diris la maljunulo, "bonvolu deiri en mian boaton, kiu treniĝas apud la ŝipo."

"Jes, Sinjoro," li diris; kaj li glitis malsupren, laŭ la takelo, kaj sidigis.

“Nu, S-ro Diablo,” diris la ŝipestro, elprenante etan salkuleron el sia poŝo, “elĉerpu la tutan akvon de ĉi tiu flanko de la boateto, kaj transigu ĝin al tiu flanko, uzante kiel ilon mian etan salkuleron!”

!!! La Diablo povis nur rigardegi lin!

“He,” li diris fine, “el kiu el la novanglaj ŝtatoj vi venas?”

“Jen du poentoj al mi, ĉu ne?” diris la maljunulo.

“Jes,” respondis la Diablo, grimpante sur la ŝipon, “du al vi. Du al vi, kaj unu decidota. Nu, kian ruzon vi nun elpensos?”

“S-ro Diablo,” diris la maljunulo kun mieno treege naiva, “vi vidas, ke mi elstreĉis la kablون, preta por faligi la ankron. Nu, jen Ĉips sur la antaŭkastelo,—laŭ mia ekkrio li faligos la hokon. Bonvolu haltigi la ĉenon per viaj grandegaj manoj kaj teni la ankron sur la ŝipo. Ĉu jes?”

Do, la Diablo demetis sian jakon, kraĉis en la manojn, kunfrotis ilin, kaj pretiĝis apud la bitoj.

“Preta, Kapitano!” li kriis.

“Ĉu vi estas preta, Ĉips?” demandis la maljunulo.

“Tute preta, Sinjoro,” respondis la ĉarpentisto.

“Do faligu la ankron!” Tinte, tinte, Ĉips elfrapis per sia martelego la pinglon; kaj foriris la duontuna ankro, trenante la grasumitan ĉenon tra la ĉentubo en kvinmejlan profundaĵon de la maro de Dio. Kiel mi diris, la ŝipo troviĝis en la Hinda Oceano.

Kaj jen la Diablo, ekprenante la kablون jen tie, jen ĉi tie, kaj la grasumita ĉeno ĉiam pli rapide glitadis tra liajn ungojn; foje, maŝo da ĉeneroj suprensaltis, kaj frapis lin apud la okulo!

Fine la ĉeno estis preskaŭ elĉerpita, kaj la Diablo rapidis en la direkton de la lasta ĉenerego, kiu kompreneble estis ligata al la mal-supro de la antaŭa masto. Li metis siajn du brakojn tra la ĉeneron kaj al kroĉiĝis kiel ŝraŭbtenilo.

Sed, kiam la ĉeno elĉerpiĝis, okazis tia ekskuo, ke la ligilo rompiĝis, kaj ho!, vidu!, for ĝi iris, tra la ĉentubon, inter ekbrilo de fajreroj kaj nubo de rusto, kunelportante la Diablon!

La maljunulo rigardadis antaŭen, observante la krevantajn vezikojn sur la oceano, sed la Diablo tute ne venis supren.


Ne plu estis Diablo. Li mortis.

Do la maljunulo antaŭeniris al la antaŭkastela pordo kaj frapegis sur ĝin.

“Ek al la laboro!” li ekkriis, “kaj surŝipigu mian boaton!”

KELKAJ MARISTAJ TERMINOJ EN LA RAKONTO

Ĵibŝkotalventa aŭ *tri ŝkotojn alvente* — stato de ebriceo kaj gajeco. La ŝipestro nomiĝas *la maljunulo*. *Huranesto* — grava krizo. Sur britaj ŝipoj la ĉarpentisto ĉiam nomiĝas *Ĉips*, kaj la kuiristo *Doktoro*.





DEZIRAS KORESPONDI

Anoncoj: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo, (resp. kup. valoras dek cendojn). Enlande, unu vorto por du cendoj. Abonanto aŭ membro, anonco senpage. Komerca anonco, unu vorto por tri cendoj.

- Aŭstrujo.** F-ino Herta Vrabec, Giessergasse 4/16, Wien. 19-jara oficistino dez. kor. kun amerikaj geesperantistoj.
- Bulgarujo.** F-ino Svetanka Andreeva, v. Oŝani, Drenovska. Dez. kor. kun juna Esperantisto en Usono.
- Ĉeĥoslovakujo.** František Ryšavy, Trharny, N. P., *Ivančice u Brna*. 25-jara oficisto dez. kor. kun fraŭlinoj en Usono, iŝ. PM.
- Ĉeĥoslovakujo.** Jan Ev. Slavek, Kalininova 36, *Praha XI*. 60-jara doganoficisto dez. kor., iŝ. il. PK, gazetojn, turist-prospektojn, fotojn.
- Ĉeĥoslovakujo.** Milan Srnc, Plzeňská 65, *Ostrava-Hulvaky*. 14-jara lernanto dez. kor. kun samaĝaj geknaboj, iŝ. PM, il. PK.
- Germanujo.** Ludwig Wiechers, Friedrichstr. 9a, *Northeim i Han.* 17-jara, dez. kor. prefere kun radio-amatoro.
- Hispanujo.** Juan Jerez Simon, c/Amilcar 42 pral 1^a, *Barcelona*. 18-jara, dez. kor. kun juna samideanino.
- Hispanujo.** Alejandro Moreyra, Dr. Náchter n^o 133, *Chiva* (Valencia). Grupo de junuloj dez. kor. kun fraŭlinoj 16-22 jaraj.
- Hungarujo.** Tibor Horváth, Baross Gabor utca 9, *Gyongyös*. Dez. koresp.
- Hungarujo.** Ferenc Sugataghy, Dorozsmai ut. 105, *Kiskundorozsma*. 19-jara dez. kor. kun usonanoj pri ĉiuj temoj, iŝ. il. PK.
- Italujo.** S-ino Lilliana Bulgarelli, Via Focherini 2, *Mirandola* (Modena). Deziras korespondi kaj interŝangi PM.
- Japanujo.** Ŝiro Suzuki, Sakae-ĉo 38, Kita-ku, *Tokio*. 22-jara laboristo, deziras koresp. pri ĉiuj temoj.
- Jugoslavujo.** Franc Jerše, Križo, z. p. *Komenda* (Slovenija). Deziras korespondi, interŝ. PK, PM.
- Jugoslavujo.** F-ino Lubica Perišić, Vučitrnska 4, *Beograd*. 18-jara lernantino dez. kor. pri sporto, filmo.
- Koreo.** Kyongnyong Kim, No. 200-18, 2nd Ka, Malli-dong, Seodaemun-Koo, *Seoul*. Deziras korespondi.
- Kostariko.** Hugo Mora Poltronieri, Apartado 3175, *San Jose*. 19-jara nova Esp-isto dez. kor. kun gejunuloj en Usono, iŝ. PK.
- Litovujo.** Antanas Bartnikas, Raŝytoju g-ve Nr. 6, Knygu rumai, *Vilnius*. Deziras korespondi kun iu samideanino.
- Pollando.** Jerzy Bernatowicz, ul. Grodzka 5/1, *Gdańsk*. Dez. kor. iŝ. PK.
- Pollando.** Stanisław Kahl, Rynek 6 m. 4, *Krotoszyn*, woj. Poznań. Dez. koresp., interŝ. PK, PM, alument-etiketojn.
- "*Boletín*", monata organo de la Hispana Esperanto-Federacio, bele presita parte en Esperanto parte en Hispana lingvo. Interesaj raportoj pri la enlanda movado, kun bonaj artikoloj literaturaj. Jarabono \$1.25. Abonebla ĉe EANA, 114 West 16 St., New York II, N. Y.
- "*The British Esperantist*", official organ of the British Esperanto Association. Monthly, 20 pages, illustrated. Partly in Esperanto, partly in English. Subscription one year \$1.50. Order through EANA.
- "*Introduction to Esperanto*", The Universal Language, 3rd Edition, price \$2.00. Sent on five days examination free. Box 792, Placerville, Calif.

EXCELLENT ESPERANTO RECORD

This *Esperanto Pronunciation and Practice Record* is interesting, instructive and entertaining. You can use it as a fascinating game – solitaire or group. It answers questions often asked such as: "What does Esperanto sound like?", "Is it easy to understand?", "How is it used?". And you can utilize the new record to get a running start in learning the world inter-language, to check your pronunciation, to test your understanding, to step up your fluency, and as a model of correct speech. It is also a valuable promotion aid, and it is very useful for demonstrations and talks to show the facility and practicality of Esperanto. A specially prepared complete Guide goes with every record; including translations.



YOU ACTUALLY CONVERSE WITH THE RECORD

Non-breakable "Vinylite" – 78 RPM. Price \$1.50 Postpaid. To Members of EANA, or in quantity only \$1.00 Postpaid.

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower – dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Ass'n of N. A., 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.